



**PILO-PRESS**

Internacia  
Informservo

N-ro 23/77 - 9 jun 1977  
Aperas ĉiusemajne



Glumarkoj

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (0911) 46 36 49; 5142 69

20 ekz. 1,30 DM  
100 ekz. 5,-- DM

**Menschlich gesehen**



Post aus aller Welt

Immer wenn es Weihnachten um die Geschenke ging und die Kinder in der Nähe waren, dann parlierten Elsbeth Bormann und ihr Mann Werner in Esperanto. Das ging so lange gut, bis Thomas, der Älteste, eines Tages sagte: „Du Mutti, ich weiß jetzt, was ich kriege. Ich habe alles verstanden.“ Seitdem ist Thomas in der Jugendgruppe der Sprachensprache.

Diese Kunstsprache, 1887 von dem polnischen Arzt Dr. Ludwig Zamenhoff entwickelt, ist für Elsbeth Bormann wesentlicher Teil ihres Lebens. Um so mehr, als sie jetzt auf dem Bundeskongress der Esperantisten zur Vorsitzenden gewählt wurde.

Ein hoffnungsvolles Zeichen für die 47jährige Kindergärtnerin, deren großer Wunsch in den Wirren der schlimmen Kriegs- und der Nachkriegszeit entstand: Als keiner keinen verstand oder verstehen wollte, sehnte sie sich danach, einmal frei reisen und mit vielen Menschen über alles reden zu können. Esperanto ist für sie der Schlüssel dazu.

Diese Sprache nimmt sie inzwischen so gefangen, daß die einst sehr aktive SPD-Politikerin es vorzieht, sich nur noch diesem Mittel der Völkerverständigung zu widmen. Und jetzt will sie noch mehr für ihre Sache tun, seit sie den Bundesvorsitz übernommen hat. mic.

El homa vidpunkto

Hamburger Abendblatt

Marde, 7 junio 1977

Titolpaĝo

Bondeziroj de Federacia Kanceliero

Bonn/Hamburg (pp) - Federacia kanceliero

Helmut Schmidt sendis al s-ino Elsbeth Bormann okaze de ŝia elekto al prezidanto de Germana Esperanto-Asocio jenan gratulotelegramon:

" Liebe Elsbeth, wie ich aus der Presse erfahren habe, bist Du vor kurzem zur neuen Bundesvorsitzenden des Deutschen Esperanto-Bundes gewählt worden. Ich möchte Dir dazu sehr herzlich gratulieren und für die Zukunft von Herzen Glück und Erfolg wünschen.

Dein Helmut Schmidt, Bundeskanzler"

Traduko:

Kara Elsbeth, kiel mi eksciis el la gazetaro, vi estis elektita antaŭ nelonge al nova federacia prezidantino de Germana Esperanto-Asocio. Mi ŝatus kore vin gratuli pro tio kaj deziri por la estonteco bonŝancon kaj sukceson.

Via Helmut Schmidt, Federacia Kanceliero

\*\*\*\*\*

Hamburger Abendblatt pri Elsbeth Bormann

Hamburg (pp) - Hamburger Abendblatt, renoma gazeto, sur la titolpaĝo publikigis en sia eldono de la 7-a de junio 1977, portretan feliĝeton pri s-ino Elsbeth Bormann okaze de ŝia elekto al prezidantino de Germana Esperanto-Asocio. Vidu maldekstre!

+++++

Reeldono de LOT-bulteno

Varsovio (pp) - En la lastaj tagoj la Polaj Aerlinioj LOT reeldonis la bultenon "La historio de unu artafiŝo," kies unua eldono rapide elĉerpiĝis kaj elvokis grandan interesigon. Oni mendu la senpagan bultenon ĉe: LOT, str. 17 Stycznia 39, PL-02-148 Varsovio, Pollando. La aŭtoro de la bulteno estas red. Juliusz Pegiel, en Esperanton tradukis red. Andrzej Pettyn.

LOT jam de kelka tempo uzas Esperanton por siaj publikaĵoj.

## La arto insulti en Esperanto

### Prelego dum la IFEF-kongreso de Marjorie Boulton

Swanwick (pp) - Kiel ni jam informis en PP n-ro 21/77, la 29-a Kongreso de Internacia Fervoja Esperanto-Federacio okazis de la 13-a ĝis 20a de majo en la brita urbo Swanwick. La kongreson partoprenis 346 personoj el 17 landoj.

Unu el la furorajpersonuloj de la IFEF-kongreso sendube estis la konata Esperanto-poetino Marjorie Moulton. Ŝi ne nur parolis pri "Zamenhof kaj la fervojo", ne nur instruis antaŭ granda ĉeestantaro Esperanton laŭ rekta metodo, ne, ŝi ankaŭ instruis al la kongresanoj la "arton insulti en Esperanto, kun aparta konsidero al fervojisto".

Laŭ Marjorie Boulton insulti en Esperanto havas tri ĉefajn celojn:

- 1) Montri rekte al persono malestimon, malamon, celi vundi homon;
- 2) Malŝarĝi la propran animon;
- 3) Sperti artan ĝuon.

Ŝi diris, ke, se necesas insulti, oni tion faru inteligente. Stereotipa sakrado ne nur efikas ne interese kaj ofte stulte, enue, kaj perdigas la terapian valoron. Ŝi donis multajn konsilojn kaj ekzemplojn, kaj fine ŝi konkludis, ke se fie agi, pli bone pervorte ol perforte.

Pro la prelegoj kaj pro aliaj helpoj al IFEF prezidanto Giessner ekonomis d-rinon Marjorie Boulton membro de Honora Patrona Komitato de IFEF.

Laŭ la kongresa bulteno n-ro 2 la kulmino de la kongreso, ja la vera kaŭzo kaj pravigo, estis la fakprelego pri "Vagondispozicio kaj cirkuladkontrolado ĉe la brita fervojo per elektronika operacio.". La prelegon, kiun faris S-ro Frank Curtis, kunlaboranto ĉe la fako TOPS (Tutoperacia procesrega sistemo) de la Britaj Fervojoj, akompanis 2 filmoj kaj diapozitivaj.

Dum la kongreso okazis ankaŭ maneken-parado, gvidita de s-ino Margret Brandenburg, laŭ la antaŭ jaroj verkita skeĉo de Marjorie Boulton. Ĉarmaj kongresaninoj bele kaj profesi-aspekte prezentis la diversajn kostumojn taŭgajn por kongresvojaĝo kaj kongresrestado.

Fine menciindas la naciaj kostumoj de iuj kongresanoj el Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Francio, Turkio, Svedio, Svislando, Kamaro. Ankaŭ germana grupo da kongresanoj el Lichtenfels-Soburg (Bavario) en tipa kostumo el Supra Frankonio sin prezentis dum la kongreso, kaj speciale dum la balo, kaj kantis du kantojn. Ili estis videbla en la Brita Televido, kiu filmis dum la balo.

### 4-a Somera migrado en Svisio

Neuchâtel (pp) - De la 20-a ĝis la 25-a de aŭgusto 1977 okazos en la Svisaj Alpoj, en Valezo (kantono dulingva) la 4-a Somera Migrado en Svisio.

Petu informojn pri detaloj de Svisa Esperanto-Junularo, SM 77, Verger Rond, CH-2000 Neuchâtel, Svislando.

### Esperturist

Triesto (pp) - Naskiĝis "ESPERTURIST", turisma agentejo kiu proponas al aventuruloj, geedzaj paroj aŭ malgrandaj familioj, sorĉajn vojaĝojn en forajn ekzotikajn landojn per speciale ekipitaj aŭtobusetoj.

Oficiala lingvo de la agentejo estas Esperanto, kaj esperantistoj ĝuas favorajn kondiĉojn. La provizora adreso de la agentejo estas: ESPERTURIST, via Lorenzetti 42, I-34144 Triesto, Italio.

\*\*\*\*\*

Pilo-Press, ĉiusemajna informservo, jara abonkotizo 30,- GM  
Pagebla al Ludwig Pickel, Nürnberg, PSCHK Nürnberg 819 56-851

## Euronews el BBC

### Interesa respondo de BBC

Rotterdam/London (pp) - BBC, la Brita Radio, en aprilo anoncis, ke oni diskutas la eblecon disaŭdigi novaĵojn pri la Eŭropa Komuna Merkato trifoje tage, en tri lingvoj nome en la angla, franca kaj germana, sub la nomo "Euronews" (Eŭropaj Novaĵoj).

S-ro Lawrence Mee, kiu aŭdis la anoncon, tuj skribis al la Direktoro de BBC kaj demandis, kial la novaĵoj estu nur en la angla, franca kaj germana. Ĉu la nederlandanoj, la danoj kaj la italoj ne gravas, li demandis. Kaj fine s-ro Mee proponis ankaŭ Esperanton.

### Respondo de BBC

Per letero de la 13-a de majo 1977, Alexander Lieven, Direktoro de la Eŭropaj Servoj de BBC, respondis jene:

"Dankante vin pro via letero al la Ĝenerala Direktoro pri la proponoj por komuna radio-servado al Eŭropo, permesu ke mi klarigu, ke la elekton de la angla, franca kaj germana lingvoj por komenci la proponitajn disaŭdigojn instigas la fakto, ke tiuj estas la tri plej vaste komprenataj lingvoj en tiu mondparto. Ili reprezentas la esencan minimumon kiu, ni esperas, estos sekvata en ĉiu el la aliaj lingvoj post kiam la projekto jam montris sian valoron. Mi estas, efektive, en intima rilato kun la disaŭdig-instancoj en la aliaj landoj koncernaj.

Vi komprenos, kaj ke iu disaŭdigo en Esperanto bezonus la konsenton de ĉiuj partioj implikitaj en la projekto, kaj ke tiu estus akirita nur per aktiva publika subteno en la kelkaj celataj landoj."  
(Traduko de Lawrence Mee)

\*\*\*\*\*

## Unua internacia lerneja semajno

Saint Gerard (pp) - La unua internacia lerneja semajno en la dua regiono de Eŭropo efektiviĝis de la 14-a ĝis la 22-a de majo 1977 en la junulargastejo de Saint-Gerard, Belgio. Partoprenis 148 infanoj el 5 landoj: Belgio 16, Francio 18, F R Germanio 52 (lernejoj Peine, Dollbergen, Balge), Nederlando 48 kaj Jugoslavio 14. La infanoj estis instruataj de 10 geinstruistoj laŭ 8 klasoj en la fakoj matematiko, Esperanto, geografio, muziko, desegnado kaj sporto.

## El la sveda jarraporto 1976

Stockholm (pp) - El la ampleksa raporto pri la agadjaro 1976 de Sveda Esperanto-Federacio ni citas:

Je la fino de 1976 Sveda Esperanto-Federacio havis iom pli ol 1 700 membrojn. Tio reprezentas etan kreskon kompare kun 1975. La kresko ja estas je nur kelkdek membroj, sed tio estas plua pruvo, ke la tendenco je stagno kaj malkresko de la membronombro estas rompita. SEF havas daŭre 52 klubojn.

SEF estis 70-jara en 1976. Ĝi ne speciale festis tiun sian jubileon. La membroj daŭrigis sian laboron por Esperanto kaj la rezulto ne fariĝis malbona.

Estas malfacile en la jarraporto trovi ion, kion oni povus nomi "elstara agado". La jarraporto montras, ke SEF estas forta kaj aktiva organizo. Denove iom kreskis la membronombro, novaj agadoj estis pri diskutitaj kaj starigitaj.

La preskaŭ neimagebla bona rezulto de la monkollekto por la nova vortaro montras grandan oferecon kaj sindediĉon de la membroj. La estraro vidas en tio pruvon, ke la intereso pri Esperanto pli kaj pli kreskas, ke la membroj pli kaj pli fidus al siaj propraj fortoj.

### Invito al kampadejo "Tenuta Primero"

Grado (pp) - Sur la internacia kampadejo "Tenuta Primero", Grado, Italio, esperantistoj povas pasigi siajn somerajn feriojn. Estas dezirinde, ke multaj esperantistaj kampadistoj renkontiĝu tie. Pri la kampadejo aperis prospekto ankaŭ en Esperanto. Laŭ ĝi la kampadejo "Tenuta Primero" estas la plej moderne ekipita el tiuj situantaj laŭlonge de la alta Adriatika marbordo inter Venecio kaj Triesto.

Informojn donas: Camping International Tenuta Primero, Adria Bungalows, I-34073 GRADO, Italio, aŭ Gorizia Esperanto-Asocio, Pro Loco, Borgo Castello, I-34170 Gorizia, Italio.

### Mondanistaj Asembleoj

Parizo (pp) - De la 1-a ĝis la 10-a de julio 1977 okazos en Parizo la Mondanistaj Asembleoj. Ili konsistos el

- 1) Mondanista Asembleo de la Mondcivitanoj
- 2) 17-a Kongreso de la Universala Movado por Monda Federacio
- 3) Studtagoj de Ne-Registraj Organizoj
- 4) 5-a Elektado de la Delegitoj al la Kongreso de la Popoloj.

La Internacia Esperanto-Centro de la Mondcivitanoj (8, rue Rouget de Lisle, F-3000 Nimes, Francio) invitas esperantistojn.

Informojn donas: Registre International des Citoyens du Monde, 55, Rue Lacépède, F-75015 Paris.

### Esperanto en Radio

Varsovio: Dum la pasintaj tagoj oni aŭdis ĉefe la voĉojn de Barbara Pietrzak kaj Milada Szveto. Kie estas la viroj? Ĉu ili maldiligentas? Favore kaj pozitive Barbara P. recenzis la numeron 1/77 de Eŭropa Esperanto-Revuo en la Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo. Speciale ŝi substrekis la ligitecon de DER kaj Pilo-Press al la fenomeno "Esperanto en Radio". En la pasinta Esperanto-Ekspreso aŭdiĝis ampleksa nekrologo pri la antaŭ nelonge mortinta germana esperantisto Josef Kreitz, Köln, iama prezidanto de Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj.

En majo la Esperanto-redakcio de Pola Radio ricevis 450 korespondantojn. Je la pinto inter la korespondantoj staras Trude kaj Paul Thomas, GDR, kaj Ernst Höpfler, F R Germanio, kiuj mezindice ĉiutage sendis po 2 raportilojn. 25 aŭskultantoj skribis al la redakcio la unuan fojon. La statistiko laŭ landoj montras jenan vicon: Germana Demokrata Respubliko 97, F R Germanio 73, Sovetunio 55, Francio 49, Hungario 48, Ĉeĥoslovakio 45, Britio 27, Italio 10.

Vieno ORF estas nun tre bone aŭdebla. La semajna komentario de d-ro Alfred Macher ĉi-foje temis pri la nord-suda dialogo. Emil Vokal raportis pri la Esperanto-tagoj en la hungara ĉe-landlina urbo Sopron. Ĉiam interesa estas la leterkesto.

Radio Vatikana. Pastro Jakobitti intervjuis TRIKSINI aŭ pastron Hansjörg Kindler pri lia agado en Luksemburgio.

Svisa Kurtonda Radio. S-ro Gacond daŭrigis sian prelego-serion pri "Esperanto kaj Interlingua" kaj Heidi Baur memorigis pri la 150-a datreveno de la naskiĝo de Johanna Spyri, aŭtorino de la rakonto "Heidi".

Romo. Ankaŭ tiu stacio nun estas iomete pli bone aŭdebla. Bedaŭrinde estiĝis unu el la voĉoj de Radio Roma: Ia 21-an de majo neatendite mortis d-ro Cesare Arieti, en ankoraŭ juna aĝo. Li kunlaboris ĉe la Radio Roma en 1975/1976. Li estis la unua kaj ĝis nun la sola, kiu eltenis formalan ekzamenon pri Esperanto ĉe la itala radio.

\*\*\*\*\*

Aŭskultu kaj skribu al la Esperanto-Radio-stacioj!